

Membroj de Pontoj de amo kaj Code Pink alvenas al Kubo



Foto: ACN

Santa Clara, a?g 25 (RHK) Representantoj de la solidarecaj projektoj Pontoj de Amo kaj Code Pink alvenis ?i-?a?don al la Infana Hospitalo José Luis Miranda, en la kuba centra provinco Villa Clara, por liveri donacon de 1,6 tunoj da fortika pulvora lakto kaj ?irka? 300 medikament-boteloj.

Kuba-usona profesoro Carlos Lazo, gvidanto de Pontoj de Amo, diris al la gazetaro, ke la iniciato, akompanata anka? de la Kuba Instituto por Amikeco kun la Popoloj, inkluzivas entute kvin mil funtojn da pulvora lakto (?irka? 2,2 tunoj) kaj 100 mil tabeloj da medikamento por disdoni inter la pediatria hospitaloj de Cienfuegos, Sancti Spíritus, kaj Villa Clara en la centra regiono de Kubo.

Same li emfazis, ke surbaze de la kunlaboro de usonanoj kaj kubanoj lo?antaj en la norda lando, ili portos diversajn produktojn al la kultura centro El Mejunje en Santa Clara, kaj anka? lerneajn materialojn por instruejo kaj panma?inojn por domoj de infanoj sen familia protekto.

Li aldonis anka?, ke estas privilegio povi atingi Kubon per tia donaco, ?ar ?i estas lando kie, malgra? la ekonomiaj malfacila?oj truditaj de la blokado, la vivoj de homoj estas protektataj.

Per salutvortoj, Ángel Camacho Gómez, direktoro de la pediatria institucio en Villa Clara, rekonis la gravan laboron faritan de Pontoj de Amo kaj dankis ?i tiun solidarecan geston, kiu pruvas la eblecon rompi la barojn inter amba? popoloj.

Pontoj de Amo ne distingas inter religiaj kredoj a? ideologioj, la sola afero, kiu kunigas ?iajn membrojn, estas la batalo kontra? la usona blokado kaj respekto al nacia suvereneco, tial ?i estas tiel diversa kaj ampleksa projekto, diris Carlos Lazo.

Dum la turneo de la provinca ?efurbo Villa Clara, la reprezentantoj de amba? projektoj anka? vizitis la domon n-ro 1 por infanoj sen familia protekto, kie ili eksciis pri la aparta?oj kaj funkciado de ?i tiu speco de edukaj instala?oj, el kiuj jam ekzistas ses en tiu ?i centra geografio, por provizi protekton al pli ol 40 neplena?uloj.

Fonto: ACN

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/332333-membroj-de-pontoj-de-amo-kaj-code-pink-alvenas-al-kubo>



Radio Habana Cuba